



PILO-PRESS

Internacia

Informservo

N-ro 3/77 - 18 jan 1977

Aperas ĉiusemajne

Ĉu vi jam sendis

vian salutanon-

ceton okaze de

la Semajno de

Internacia

Amikeco?

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel

Postfach 2113

D-85 Nürnberg 1

Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

Unua Kolombia Esperanto-Kongreso

Medellin (pp) - Proksimume 100 ĉefe junaj entuziasmaj esperantistoj el 22 urboj de Kolombio ĉeestis la Unuan Kolombian Esperanto-Kongreson, kiu okazis de la 10-a ĝis la 12-a de decembro 1976 en Medellin. La partoprenantoj preparolis la estontan komunan agadon de la landa Esperanto-movado kiu ĝis nun ekzistis el pli aŭ malpli izolitaj grupoj. Vojaĝi en Kolombio estas malfacile pro malbonaj vojoj kaj multekoste pro la longaj distancoj - la lando estas preskaŭ same granda kiel Eŭropo. Tial estas ĝojige ke tiom da personoj ĉeestis. El eksterlando partoprenis tri delegitoj el Venezuelo kaj unu el Nederlando.

La estraranoj de la Antiokia Esperanto-Ligo el Medellin tre bone organizis la kongreson. Dank' al la rektoro de la fama universitato Pontifika Bolivariana la granda salono kaj kelkaj kunvenejoj estis senkoste je la dispono de la kongreso. Radio kaj ĉefaj gazetoj en la lando informis pri la kongreso; ĉie en la urbo aperis belaj afiŝoj kaj bonkvalitaj faldfolioj en la hispana lingvo pagitaj pere de anoncoj de 28 gravaj firmaoj.

Dum la inaŭguro, vespere la 10-an de decembro, la kongresa prezidanto, Ing. Miguel Cano, aparte bonvenigis la skabenon pri instruado, kiu salutis la kongreson nome de la urba registaro. Prof. D-ro Manuel Angel Munoz bonvenigis la kongresanojn nome de la Antiokia Esperanto-Ligo. Por la Venezuelana Esperanto-Asocio parolis Prof. J.E. Bachrich kaj por Nederlando kaj Eŭropa Esperanto Centro S-ino J. H. Hoekstra-Sieders.

Sabate, je la 11-a de decembro, reprezentantoj raportis pri la laboroj en siaj regionoj. Oni elektis komisionojn kaj redaktajn komitatojn. La landa prezidanto, Prof. D-ro Augusto Ochoa, kiu dum 1974 estis en Eŭropo, prelegis pri lingvo- kaj Esperanto-instruado al etaj infanoj kaj la malgustaj teorioj kiuj ekzistas pri tiu temo. Prof. D-ro Manuel Angel M. pritraktis la rektan instrumentodon kaj siajn spertojn pri Esperanto-instruado en la universitato Pontifika Bolivariana en Medellin. Tie ekzistas unua, dua- kaj tri-grada kursoj, samrajtaj al alilingvaj kursoj. Prof. J.E. Bachrich el Venezuelo donis interesan kontribuon per la temo: "Kion, kiel, kiam kaj kiom instrui en elementa kurso?" Sekvis diversaj aliaj prelegoj kaj diskutoj.

Posttagmeze laborgrupoj interŝanĝis opiniojn kaj prezentis proponojn pri jenaj temoj: a) Historio de Esperanto en Kolombio; b) Enkonduko de Esperanto en la ĉiutaga vivo; c) Strukturigo de la Esperanto-movado en Kolombio; ĉ) Komunikado kaj informado.

Dum la distra vespero grupo el Bukaramanga prezentis teatraĵon; d-ro Ochoa deklamis kaj konataj muzik- kaj kantgrupoj kompletigis la programon.

Dimanĉe, la 12-a de decembro, la laborgrupoj prezentis siajn plahojn, proponojn kaj opiniojn rilate al la koncernaĵ temoj kaj donis valorajn kontribuojn por la estontaj agadoj de la Kolombia Esperanto-movado.

La plano de la sekretario L.G. Restrepo el Medellin pri starigo de disvolv-centroj kaj la kongresa dokumento, prezentita je la fino de la fino de la kunsido, profunde pritraktis la estontan laboron.

Unua Kolombia Esperanto-Kongreso (daŭrigo)

Oni akceptis jenajn proponojn:

- a) Subteno de la laboro de UEA en UNO - UNESKO.
- b) Instigi kulturajn, instruajn kaj registarajn organizaĵojn por subteno al la instruado de Esperanto kaj de la Esperanto-movado, kaj strebi al plia apogo de universitatoj.
- c) Instigi entreprenojn kaj aliajn instancojn al uzado de Esperanto en internaciaj rilatoj por komercaj kaj aliaj celoj.
- ĉ) Plia integriĝo, naciskale kaj en Latin-Ameriko, de la Esperanto-movado.
- d) Instigo al partopreno de eksterlandaj kongresanoj al la landaj kongresoj por plifortigo de la kunlaboro.
- e) Plia kunlaboro kun UEA por esti efike reprezentata en internaciaj medioj.

Tri pastroj-esperantistoj, sub gvido de pastro L.E. Palacios Toral, celebris imponan sanktan meson.

En sia ferma parolado Ing. Miguel Cano esprimis sian dankon kaj kontenton al la partoprenantoj kaj kunlaborantoj, kiuj esprimis la volon disvastigi kaj praktiki Esperanton en siaj regionoj en Sud-Ameriko kaj aliaj kontinentoj.

Komuna lunĉo en la botanika ĝardeno agrable kompletigis la finon de la kongreso. Estas planite, okazigi la venontjaran kongreson en Bogoto.

Raportis J.H. Hoekstra-Sieders

Junularaj aranĝoj

Internacia Junulara Festivalo de IEJ

Leviko (pp) - Sub la temo "Esperanto-instruado kontraŭ la socia diskriminacio" okazos paskon ĉi-jare, de la 7-a ĝis la 11-a de aprilo, en la norditala urbo Levico Terme (Leviko), proksime al Trento, Internacia Junulara Festivalo, aranĝota de Itala Esperanto-Junularo (IEJ). Informojn pri la programo, partoprenkotizo ktp. donas: Itala Esperanto-Junularo, Poŝtfako 210, I-56100 Pisa, Italujo.

Pri la signifo de tiu aranĝo por la junaj italaj esperantistoj IEJ skribas: "Por nia landa sekcio, kaj pli ĝenerale por la estonteco de la movado en Italujo, estas tre grave, ke al tiu ĉi renkontiĝo partoprenu rimarkinda kvanto da eksterlandanoj. Dum la lastaj jaroj, en nia lando, evidentiĝis du faktoroj en la evoluo de la junulara movado, same gravaj - sed kontrastaj.

Unu, tre pozitiva, la alveno de pluraj junuloj en la movado, kiuj povus tre efike kunlabori en la agado ankaŭ internaciskale, kaj kies aĝo estas ĝenerale tre malalta, kompare al la kutima TEJO-averaĝo. La dua, negativa faktoro, fontas el pli ĝeneralaj problemoj de Italujo (kiel la tendenco ekgraviti ĉirkaŭ Mediteraneon, anstataŭ ol en Eŭropo, kaj kiel la ĉiam pli pezigantaj ekonomiaj kaj devizaj problemoj), kiuj baris kaj baras al italoj, ĉefe al la junuloj, partoprenon en internaciaj aranĝoj, kaj kies natura konsekvenco estas neoportuna izoligo.

Por kontrasti ĉi negativan faktoron, kaj tiel ankaŭ permesi al la internacia movado kontakti la cititajn novajn italajn junulojn, Itala Esperantista Junularo decidis aranĝi ĉi tiun festivalon."

Dum la festivalo okazos ankaŭ internacia kurso por komencantoj, je du diversaj startniveletoj.

Internaciaj intensaĵ Esperanto-kursoj de GEJ

Kiel (pp) - Dum pasko 1977 Germana Esperanto-Junularo (GEJ) okazigos intensaĵ Esperanto-kursojn por komencantoj kaj progresemuloj. Oni atendas ĉirkaŭ 40 partoprenantojn, kiuj lernos en kvar aŭ kvin malgrandaj grupoj konsistantaj el partoprenantoj de malsamaj gepatraj lingvoj. Dato: 9-a ĝis la 15-a de aprilo 1977.

Loko: Cuxhaven, norda Germanujo

Detalajn informojn donas: Klaus Schubert, Hindenburgufer 80/81, D-2300 Kiel 1.

Lingvopolitika diskuto apud Paderborn

Paderborn (pp/hb) - La 14-a de januaro 1977 okazis en Rietberg apud Paderborn lingvopolitika podia diskuto, al kiu invitis la Lingvopolitika Laborrondo de la Eŭropa Klubo. Partoprenis la diskutadon reprezentantoj el ĉiuj 3 politikaj partioj de Federacia Respubliko Germanujo: Prof. D-ro Helmar Frank kaj parlamentano Jürgen Hinrichs (F.D.P.), Karl Hachmann (SPD), parlamentano Dr. Heinrich Ehlmeier kaj rektoro Cornelius Trimborn (CDU). Temo estis: Eŭropa interkompreniĝo - en kiu lingvo?

Inter la diskutintoj nur prof. Frank kaj rektoro Trimborn sciis la Internacian Lingvon. Oni sufiĉe vaste kaj profunde diskutis la lingvan situacion kaj la diversajn vojojn por solvi aŭ mildigi la lingvan problemon. Fine oni starigis la demandon, ĉu fakte jam nun io konkreta estus farebla en lingvopolitika rilato en Eŭropo, kaj oni unanime interkonsentis pri 2 punktoj:

- (1) Gelerntoj en la 3-a kaj 4-a elementlerneja jaro ricevu lingvoorientiĝan instruadon (Esperanton), kio jam okazas en 20 klasoj en la regiono de Paderborn.
- (2) Ekde la 7-a lernojaro oni ne plu devigu ĉiujn gelerntojn lerni la anglan. Se montriĝas, ke ili absolute certe malsukcesas en la angla, ili havu la eblecon anstataŭigi la anglan per Esperanto plus gepatra lingvo.

Pri Internacia Lingvo dum jarcentoj

La libro "Pri Internacia Lingvo dum jarcentoj" de Mag. Isaj Dratwer, kies unua eldono aperis en la 1970-a jaro, estos nove eldonita. La dua multe pliampleksigita eldono estas havebla ĝis apero por la favorprezo de 25 gld. ĉe Isaj Dratwer, Pk. 3396, BAT-JAM, Israelo.

Esperanto ĉe la Italaj Radio kaj Televido

Romo (pp/radio roma) - La artikolo 6 de la itala leĝo 14.4.1975, n.103, devigas la italan Radio-Televidan Instancon RAI "rezervi almenaŭ 5 procentojn el la totalo de la televidaj elsendoj kaj 3 procentojn de tiuj radiaĵoj, sur nacia kaj regiona skalo, al la partioj kaj al la grupoj reprezentitaj en la Parlamento, al la asociaĵoj organizoj de la lokaj aŭtonomioj, al la naciaj sindikatoj, al la religiaĵ konfesioj, al la politikaj movadoj, al la instancoj kaj asocioj politikaj kaj kulturaj, al la naciaĵ asocioj de la kooperativa movado laŭleĝe agnoskitaj, al la etnaj kaj lingvaj grupoj kaj al aliaĵ grupoj je elstara socia intereso, kiuj petu tion...".

Surbaze de ĉi tiu preskribo, kiu intencas realigi efektivan alireblecon de la influgrupoj al la rimedoj de amaskomunikado, en la kadro de demokratigo de la radia kaj televida informo, ankaŭ la Itala Esperanto-Federacio prezentis formalan peton, proponante elsendi tri debatojn

Esperanto ĉe la Italaj Radio kaj Televido (daŭrigo)

pri la jenaj temoj: "Ĉu ekzistas lingva imperiismo? Kial en la italaj lernejoj oni instruas nur difinitajn lingvojn?"; "Lingva demando en unuigota Eŭropo kaj en rilatoj kun ne-eŭropaj landoj"; "Instruado de Esperanto en italaj kaj fremdaj lernejoj: raportoj kaj rezultoj pri farita sperto".

Krome, oni proponis estigi kurson pri Esperanto en 20 - 30 elsendoj, en unuopa daŭro de 30 minutoj.

Tiucela komisiono estas nun ekzamenanta la pli ol 600 petojn, kiujn plej diversaj instancoj kaj grupoj jam prezentis.

La elsendoj ankoraŭ ne komenciĝis, sed oni jam donis ioman pozitivan reason al la peto de la Esperanto-Federacio: fakte, la 26-an de novembro 1976 sur la dua kanalo de Televido, kaj la 6-an de decembro 1976 ĉe Radio, en prezenta elsendo oni intervjuis, respektive, d-ron Nicola Minnaja (prezidanto de FEI) kaj d-ron Renato Corsetti, de kiuj oni demandis, kiel ili planas plenigi la elsendo-tempon, se oni akceptos la peton de FEI.

Esperanto en Radio

Varsovio. Nun estas certeco. Dum la jaro 1976 la Esperanto-redakcion de Pola Radio atingis 5 777 korespondaĵoj de aŭskultantoj. Tio estas kompare al la jaro 1975 kresko de ĉ. 500 korespondaĵoj.

Je la pinto de la jara statistiko staras jenaj dek landoj:

Sovetunio 1275 ; Germana Demokratia Respubliko 1065; Ĉeĥoslovakio 765; Federacia Respubliko Germanujo 604; Hungario 462; Francio 438; Britujo 409; Finnlando 191; Nederlando 191; Italujo 80.

Estus interese esplori la kaŭzon kial la prognozita nombro de 6000 ne estis atingita, kvankam fine de novembro tiu rezulto estis preskaŭ certa. Ĉu vere per tio la "kolonoj" volis protesti kontraŭ la aliformigo de la ĉiusemajna konkurso kadre de la leterkesto?

En la Esperanto-Ekspreso oni deklamis el la "Gaja Forĝisto" de Hermann Schmid, Augsburg, nome la "Pensojn pri la jarŝanĝo", kiuj finiĝas per jenaj versoj: "ne postulu tro de l'jaro nova
ĉar neniam ĝi estas ĉiopova

menciu la malnovan ankaŭ kun dankemo
ĉar solviĝis dume kelkiu problemoj"

Svisa Kurtonda Radio eldonis novan programfolion en Esperanto. En ĝi oni povas legi, ke "niaj parolistoj en la Esperantoprogramoj estas Arthur Baur kaj Claude Gacond, en la programoj ofte partoprenas iliaj edzinoj Heide Baur kaj Andrée Gacond. D-ro Baur vivas en Winterthur (kantono de Zürich) kaj estas ĉefredaktoro en la ĵurnalo de tiu urbo. Li apartenas al la Esperanto-fako de la Svisa Kurtonda Radio ekde 1947 kaj la temoj kiujn li pritraktas koncernas svisajn aferojn en politiko, kulturo kaj ekonomio. Claude Gacond vivas en La Sagne kaj laboras en La Chaux-de-Fonds (kantono de Neuchâtel). Li estas instruisto kaj samtempe sekretario de la Kultura Centro Esperantista. La temoj kiujn li pritraktas koncernas la internacian vivon en la fakoj de literaturo, historio, pedagogio kaj Esperanto."

Vieno elsendis la semajnan komenton de d-ro Alfred Nacher, kiu temis pri problemoj de la ŝtatkontrakto el la jaro 1955, kaj intervjuon kun S-ino Elfriede Ernst, Bruselo. Komprenoble ne mankis la ĉiam aktuala leterkesto. La jaŭda elsendo (je la 13,50 h) estis bonege aŭdebla en Nürnberg, sur meza ondo.